

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

28-a Jarkolekto * Marto 2012 * N-ro 95

ISSN 1576 - 0618



ECIJA

Baroka beleco, kiu enamigis al si la sunon.

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

| | |
|--|-----------|
| 71-a Hispana Kongreso de Esperanto en Almagro | 3 |
| S.ro Georĉjo, la angla | 9 |
| Surprizo en <i>The Economist</i> | 12 |
| Lingva Angulo | 13 |
| ¿Quieres ayudar al movimiento esperantista andaluz? | 18 |
| Poezio | 19 |
| Portreto de Poeto kun Azeno..... | 20 |
| Turismi en Ecija (Sevilo)..... | 25 |
| Paĝoj pri nia historio | 29 |
| Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio | 31 |
| Krucvortenigmo | 33 |
| Humuro | 34 |

Nota: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

71-a Hispana Kongreso de Esperanto Almagro (Ciudad Real)

Inter la 27-a de aprilo kaj la 1-a de majo, en la bela urbo Almagro (Ciudad Real), okazis kun granda sukceso, la 71-a Hispana Kongreso de Esperanto, kun aldono de unu plia tago, la 2-an de majo, ĉar multaj madridanoj partoprenis pro la tiudata regiona festo, kaj 3 andaluzoj el Malago kaj Sevilo, kiuj tre interesiĝis pri la ekskurso al la fama naturloko *Tablas de Daimiel*.

La unuan tagon, ni vizitis la urbon sub la gvido de lerta ĉiĉeronino, kiu rakontis al ni la interesan kaj riĉan historion de la urbo, tradukita samtempe de Jorge Camacho.

La inaŭguro estis amuza festo, ĉar la madrida grupo *Kvaropo Sinkopo*, regalis nin per belsona repertuaro kun emociaj kantoj en esperanto. Eksterlandanoj el Aŭstralio, Rusio, Bulgario, Usono, Francio, ktp, salutis nome de siaj asocioj. Dum la inaŭguro, nia samideano Alejandro Pareja gvidis bazan kurson de esperanto al kelkaj komencantoj.

En unu el la belaj salonoj de la Kongresejo (Palaco de la Grafoj *Valdeparaiso*), kie multaj el la ĉeestantoj tranoktis, la Loka Kongresa Komitato regalis nin per bongusta aperitivo kaj sinjorino faris elmontron de perbastoneta punkto, tipa artlaboro de la urbo.

Hispana Kongreso 2012 Congreso Español de Esperanto

Esperanto 125 años derribando fronteras
jarejn fuligante limojn



Almagro

27 abril/aprilo - 1 mayo/majo 2012



La membroj de la Ibera Skolo festenis sian 20-jaran datrevenon, legante belajn poemojn kaj artikolojn, inter aliaj kulturaj fendaĵoj. Manolo Pancorbo gvidis interesan babiladon *Peĉakuĉo* (vorto kun la signifo *babelado*, kiu devenas el japana lingvo), ĝi estas tre rapida prezentado, en kiu sinsekvo da prelegantoj parolas pri diversaj temoj, dum maksimumo de 6 minutoj kaj 40 sekundoj po preleganto.



Andaluza triopo en Almagro
Maldekstre-dekstre: Alfonso (Jaeno), Jordi (Jaeno) kaj Angel
(Malago)

La kialo de tiu specifa tempo, estas ke oni utiligas po dudek bildojn, kiuj ilustras la temon kaj kiuj pasas aŭtomate, kun daŭro de po dudek sekundoj ĉiu bildo. Do, prelegantoj havas apogon por la parolado, sed samtempe ili ne povas tro multe plilongigi sian eksplikon, ĉar la limon difinas ekstera proceduro.

Ankaŭ okazis ateliero pri Astronomio, sed la vetero malpermesis observadon de steloj, tamen ni spektis belegajn kaj tre interesajn bildojn pri la spaco.

Sabate vespere, ni ĉeestis belan teatran spektaklon en la plej antikva teatro de Eŭropo "*El Corral de la Comedia*". La geaktoroj

miksis la vorton “esperanto” en la dialogo de la komedieto por vigligi la etoson kaj ili ege sukcesis kaj ricevis pluvon da aplaŭdoj.

Dimanĉe okazis la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio por elekti novajn postenojn, Tonjo del Barrio estis reelektita kiel prezidanto kaj Ángel Arquillos kiel vicprezidanton.



Gepartoprenantoj en la Kongresejo
kaj
en la fama teatro-korto de Almagro



Abel Montagut prezentis la ludon “Talismanoj” kreita de li per belaj ludkartoj kaj li disdonis ilin inter la ĉeestantoj la belajn, kolorajn kaj vitrajn talismanojn.

Ne mankis kina festivalo, kun la prezento de “Stranga Nupto”, filmita antaŭ pli ol 30 jaroj en la Liceo de Esperanto de Madrido, kiun la ĉeestantoj al la lasta Andaluzia Kongreso okazinta en Sevilo jam spektis kaj ĝuis. Tonjo del Barrio, kiel kutime, prezentis sian “Kvizon”, ludo simila al televidprogramo “¿*Quieres ser millonario?*”, ĉiuj ĝuis dum unu horo en agrabla kaj kultura etoso kun ĉiaj demandoj rilate al esperanto.

Kaj la festo ne finiĝas, ĉar en la *Teatro Municipal de Almagro*, sub la nomo “Vivu la teatro!”, la Ibera Skolo kaj aliaj homoj prezentis poezian spektaklon. Nombraj partoprenantoj deklamis belajn klasikajn pecojn kaj la madrida aktorino Laura Pascual, surprizis nin per la bela spektaklo pri “La Patrino ĉe Lorca”, surbaze de tekstoj el “Sanga Nupto” de Federico García Lorca.



La granada Miguel Fernández deklamas “*Eraris ve, la kolombo*” de Rafael Alberti.

Lunde, ni ekskursis la tutan tagon al la urbo Campo de Criptana, tie ni ĝuis la belecon de la vent-mueliloj kaj la muzeon pri la aktorino kaj kantistino Sara Montiel. Tagmeze, ni kunmanĝis en bela restoracio kaj ĝuis simpatian reprezentadon pri Don Kiĥoto. Je la naŭa horo, jam en Almagro, koncertis la esperanta grupo “Kaj Tiel Plu” kaj loka kantisto Alejandro Cerro.



La kataluna ensemble
KAJ TIEL PLU.

Marde, Ana Manero prelegis pri lastaj plibonigoj kaj atingoj de Bitoteko “Hispana”, kiu estas projekto de la Ministerio pri Edukado, Kuturo kaj Sporto de Hispanio celanta arigi la hispanajn bibliotekojn, arĥivojn kaj muzeojn. Miguel Adúriz prezentis siajn lastajn verkojn “*Ne ekzistas verdaj steloj*”, la novan eldonon de sia metodo de Esperanto, plibonigita kaj korektita kaj aliajn tre interesajn novaĵojn. En tre alloga restoracio okazis la kutima bankedo kun ĉeesto de preskaŭ ĉiuj kongresanoj, kie ni gustumis bongustajn pladojn.

Post la tagmanĝo, en la kongresejo okazis aŭkcio gvidata de Tonjo del Barrio, kiu aŭkcie vendis preskaŭ ĉion kion li ofertis, t.e. libroj, esperantaj poŝtmarkoj, kasedoj, desegnaĵoj kreitaj de infanino kiu aktive partoprenis la kongreson kaj la aŭkcio mem, ktp. Poste, la Ibera Skolo oferis al ni la duan parton de sia 20-jara datreveno, kun

Belaj deklamadoj kaj legado de poemoj kaj spontanea kanto de Miguel Fernández. Tuj poste okazis la solena fermo kun aperitivo por ĉiuj kaj memoraj donacoj al la grupo de la Ibera Skolo.

Ne estas decidite kie kaj kiam okazos la venonta kongreso, eble en Zaragozo, sed oni ne povas certigi tion, HEF akceptas kandidatojn.

Laŭ mia opinio kaj sperto, ĉi kongreso estis unu el la plej grandiozaj okazintaj en Hispanio de antaŭ kelkaj jaroj.

Ángel Arquillos




Ĉi-jare partoprenis en la Hispana Kongreso kelkaj eksterlandoj. Usonano, japanino, francino, rusino, aŭstraliano... akompanis la hispanajn geesperantistojn.



S-ro Georĉjo la Angla

George BORROW naskiĝis en Britio en la jaro 1803. Siaj unuaj vivo-jaroj li pasis en Skotlando, li inkliniĝis al rajdado kaj al la natura vivo. Dum tiuj jaroj li ekkontaktis kun ciganaĵoj dank'al sia cigana amiko Ambrosio SMITH. Tiam, li decidis marŝi kun cigana familio en kies kampadejo li lernis la kulturon kaj lingvon ciganan. En la jaro 1824 lia patro forpasis, do, li iris en Londonon kie li ekstudis filologion, tamen li finis nenium universitatan studadon, kvankam lia emo lerni lingvojn ebligis al li traduki librojn el alilingvaj originalaĵoj, ekzemple *Faŭsto* de la germana Goethe, kies unua tradukisto li estis en la anglan lingvon.

Li ŝatis la romantikan vivo-manieron, pro tio li decidis vojaĝi tra Eŭropo. Kelkaj jaroj antaŭe li aliĝis al la Brita Biblia Societo, do, pere de ĉi tiu asocio li ekvojaĝis tra Eŭropo cele disvastigi la anglikanan biblion.



Li vizitis Francion, Germanion, Rusion, Portugalion, Hispanion, Marokon kaj kelkajn orientajn landojn. Ĉe la plej foraj regionoj de Rusio li eklernis la ĉinan lingvon kaj li tradukis la Novan Testamenton en tiun lingvon. Dum tiuj vojaĝoj li ankaŭ agadis kiel korespondanto de la brita ĵurnalo *Morning Herald*.

Inter la jaroj 1835 kaj 1840 George BORROW venis en Portugalion kaj Hispanion. En Madrido li malfermis vendejon por disvastigi la Biblion, dum tiu tempo li tradukis la Evangelion de Sankta Lukaso en la ciganan lingvon, sub la titolo "*Embeo e Majaró Lucas*" Tamen, kelkaj reakciaj kaj konservativaj homoj akuzis lin pri kontraŭ-katolika agado, pro tio li pasis kelkajn tagojn en la malliberejo.

Li profitis tiam por ekverki la libron *“The Bible in Spain”* (La Biblio en Hispanio), kie li parolis pri siaj vojaĝoj tra la tuta Ibera Duoninsulo, pli-malpli kiel aliaj tiutempaj romantikaj vojaĝantoj kiuj verkis pri la tiutempa mistera Hispanio.



Bildo pri la urbo Karmono en Sevilo.
19-a jarcento


Pro sia emo al ĉio rilata la ciganan kulturon, li ofte vizitis Andaluzion, kvankam liaj vortoj pri nia lando ne estis tre favoraj, jen kelkaj opinioj pri Andaluzio kaj la andaluzoj de George BORROW, kiu en Andaluzio estis konata kiel *“la angla Sinjoro Georĉjo”* (Don Jorgito el inglés).

“La andaluzoj estas maldiligentaj, malprofundaj, ili nur emas kanti kaj muziki kaj ili ĉiam inkliniĝas al sens-amaj aferoj. Ili loĝas sub la plej grandioza suno kaj la ĉielo estas la plej bela en Eŭropo. Andaluzio estas riĉa kaj fruktodona tero, tamen neniu alia loko en Hispanio estas pli mizera kaj tie la almozantoj abundas, ĉar la plej granda parto de la tero estas ne-kulturita kaj oni produktas nur kratagojn kaj trud-herbojn.”

Pri la urbo Sevilo li diris, ke ĝi estas la plej bela en Hispanio, tie li ekkontaktis kun la ciganoj. Unu el ili vendis librojn en klasik-greka lingvo, tamen la vendisto tute ne sciis pri kio ili temis. Li parolis pri vojaĝo tra la Gvadalkiviro el Sevilo en la finon de la rivero en *Sanlucar*, kaj li diris tiam, ke la ĉielo en Andaluzio estas tute simila al tiu de Hindio. Pri la urbo Granado li verkis, ke ĝi estas la plej malriĉa urbo en Hispanio. Li asertis, ke la tuta enloĝantaro, tio estas preskaŭ 60.000 homojn, vivas sub mizeraj koniĉoj, tamen li admiris la ciganojn ĉe la Sakromonta kvartalo.

La libro "*La Biblio en Hispanio*" estas leginda verkaĵo, kiu pritraktas la vivon en Andaluzio meze de la 19-a jarcento, pere de la vizio de homo kiu, duon-duone, estis brita, do li rigardas Andaluzion kiel misteran kaj povran landon, sed ankaŭ cigan-amanto, do li admiras Andaluzion ĉar ĉi tie la ciganoj vivis dum tiu tempo laŭ siaj plej naturaj principoj.

George BORROW, la angla S-ro Georĉjo, edziĝis en la jaro 1840 al vivdino de brita oficiro kaj dank'al la enspezoj atingitaj kiel verkisto, li aĉetis bienon apud Londono. Tie, li ĉiam permesis al la britaj ciganoj kampadi ĉe sia kamparo, li neniam ĉesis ami la kulturon kaj la lingvon ciganan.



Kovrilo de la libro "*Embeó en Majoró Lucas*". La Evangelio de Sankta Lukaso, tradukita en la ciganan lingvon de George BORROW en la jaro 1837.

Surprizo en

The
Economist

Intelligent Life estas la kultura revuo de la brita ĵurnalo *The Economist*. Ĝi aperas du-foje en la monato kaj ĝi pritraktas temojn rilataj al arto, modo, viv-stiloj, kuir-arto, vinoj, aŭtomobiloj... kiel proklamas la revuo mem, oni parolas pri ĉiuj aferoj ekzistantaj sub la sun'.

Unu el la plej konataj sekcioj de la revuo estas "*Big Questions*" (Grandaj Demandoj), el la revuo oni proponas konkretan demandon kaj la legantoj sciigas pri siaj opinioj. La demandoj temas pri malsimilaj aferoj, ekzemple: *kiu estas la plej belsona muzik-instrumento? Kiu invento estas ĝis nun la plej utila por la homaro? Lastatempe unu el tiuj demandoj estas jena: kiu estas la plej lerninda lingvo por britoj?* La revuo diris, ke malgraŭ la fakto, ke la angla estas la plej uzata lingvo en la mondo, evidente aliaj ankaŭ estas lernindaj. Proponoj kaj voĉdonoj abundis. Kelkaj legantoj (14%) opiniis, ke la franca estas lerninda lingvo: la ekzisto de pli ol 50 ŝtatoj kie ĉi tiu idiomo estas oficiala aŭ kun-oficiala plivalorigas ĝian lernadon.

Por aliaj (14% el la voĉdonoj) la plej lerninda lingvo estas la hispana: 400 milionoj da homoj parolantaj la hispanan plialtigas la intereson de britoj lerni ĝin. Aliaj lingvoj ankaŭ aperas sur la listo, la araba (2%) pro la beleco de la lingvo mem kaj ĝia skribado; la brazil-portugala llingvo (16 %) pro la allogeco de Brazilo mem, kiu ja estas vizitinda lando. Eĉ favore al la latina lingvo (5%) oni voĉdonis, kvankam oni agnokis, ke estis necesa multe da tempo por lerni ĝin.

Sed, kiu estas la plej lerninda lingvo laŭ ĉi tiu baloto? La 26% el la legantoj respondantaj la enketon opiniis, ke esperanto estas la plej lerninda lingvo. Laŭ leganto, esperanto estas la lingvo pri kiu ĉiuj parolantoj restas je la sama nivelo kaj oni ne ĝuas avantaĝojn. Do, bonega novaĵo por nia lingvo, ĉefe pro la fakto, ke ĝi venas el anglo-parolantoj, kaj kiel estas sufiĉe konata ne ĉiuj ili favoras al nia lingvo.

Lingva Angulo

La prepozicio “kontraŭ”

La baza signifo de la prepozicio *kontraŭ* estas “inversa direkto” kaj ĝi estas rekte tradukebla en la hispanan kiel la prepozicio “*contra*”. Tamen, ĝi posedas pli da signifoj kaj uzoj ol tiu hispanlingva prepozicio. Ni vidu ilin:

Pozicio kun direkto:

Ĉi-kaze *kontraŭ* montras pozicio de io kies antaŭa flanko situas en inversa direkto de io alia.



Karlo stariĝas kontraŭ Adela.
Carlos está de espaldas a Adela.

Do, la antaŭaj flankoj de du personoj aŭ de du objektoj estas direktitaj en inversa direkto.

Ŝanĝon en kontruan pozicion:

Ĉi-kaze *kontraŭ* montras ŝanĝon de direkto, tio estas turniĝo al nova direkto, tiam ni uzos *kontraŭ* plus N-finaĵo.

Karlos levis siajn okulojn kontraŭ la profesoron
Carlos levantó sus ojos hacia el profesor.

Tio estas, Karlo antaŭe rigardis, ekzemple, la fenestron aŭ la plankon, tiam li ŝanĝis la direkton de sia rigardado kaj nun li rigardas *kontraŭ la profesoron*. Pro la fakto, ke ekzistas movo oni uzas la N-finaĵon.

Movo kun direkto:

Ĉi-kaze *kontraŭ* estas uzata post movaj verboj, ĝi estas simila al la uzo de *direkte al... renkonte al....* aŭ similaj vortoj. Oni uzas ankaŭ la N-finaĵon ĉar ekzistas movo, tamen se la kunteksto tion permesas aŭ se la kuntuŝiĝo ne estas grava oni povas eviti la N-finaĵon.

Ekz. *Mi ekfrotis alumeton kontraŭ la muro*
Yo raspé una cerilla contra la pared

Tiel, kvankam evidente ekzistas movo de la alumeto kontraŭ la muro, tio ne estas tre grava, do oni povas diri *kontraŭ la muron* aŭ simple *kontraŭ la muro* (sen la N-finaĵo), ĉar temas pri simpla frotado de alumeto ne pri direkta tuŝo de la alumeto kontraŭ tiun muron.

Malamika ago aŭ intenco:

Ĝi estas la uzo plej ofta de *kontraŭ* (contra) en la hispana lingvo.

La politikistoj devas lukti kontraŭ la senlaboreco.
Los políticos deben luchar contra el desempleo.

Rusoj luktis kontraŭ naziojn dum la dua mondmilito.
Los rusos lucharon contra los nazis durante la segunda guerra mundial.

Ĉu uzi la N-finaĵon aŭ ne? Nu, ni vidu: se kun la malamika signifo miksiĝas ideo de moviĝo kiu atingas sian celon, do uzu la N-finaĵon. Tiel, se ni diras, ke *nazioj iris en Sovetunuiĝon en la jaro 1942 kaj tie ili luktis kontraŭ rusojn*, tio signifas, ke ekzistis invado, ne temis pri kvieta lukto, do oni devas uzi la N-finaĵon.

Tamen, se oni diras, ke *la politikistoj devas lukti kontraŭ la senlaboreco*, ĉi-kaze ne ekzistas movo en tiu lukto, do oni evitas la N-finaĵon.

Forigo aŭ defendo de malbono:

Se oni parolas pri defendo, forigo aŭ ŝirmo de kelka malbonaĵo (ekzemple: malsano, minaco, ktp), oni uzas *kontraŭ*.

La sciencistoj esploras por helpi aidosulojn kontraŭ tiu malsano
Los científicos investigan para ayudar a los que padecen sida contra esa enfermedad.

Por protekti sin kontraŭ la suno dum somero, oni devas uzi specialajn kosmetikaĵojn.
Para protegerse del sol durante el verano se deben usar unos cosméticos especiales.

Oni devas protekti la infanojn kontraŭ la malbona uzado de interreto.
Se debe proteger a los niños del mal uso de internet.

Interŝanĝo:

Temas pri ofta uzo de *kontraŭ*, ĝi estas simila al la hispanlingva “a cambio de”.

Mi aĉetis ĉi tiun antikvan libron kontraŭ kelke da mono.
He comprado este libro antiguo por algo de dinero.

Estas eble uzi ankaŭ la prepozicion *por*, ni faros tion se oni parolas tute klare pri vendo aŭ aĉeto, kaj *kontraŭ* kiam temas pri alispeca interŝanĝo. Tamen estas eble uzi *kontraŭ* ankaŭ okaze de aĉeto kaj vendo de io.

La polico oferas mil eŭrojn kontraŭ informo pri la murdisto.
La policía ofrece mil euros por una información sobre el asesino.
Mi aĉetis mian domon kontraŭ ducent mil eŭrojn.
He comprado mi casa por doscientos mil euros.

Direkto de sento aŭ ago:

Kontraŭ povas montri personon, aĵon aŭ alian aferon, al kiu direktiĝas sento aŭ ago, prefere okaze de malamikaj aŭ ne-favoraj sentoj.

Dum la juĝo la viktimo sciigis pri sia malamo kontraŭ la akuzito.

Durante el juicio la vicitma hizo saber de su odio hacia el acusado.

Post liaj insultoj mi ekkoleris kontraŭ lin.

Después de sus insultos me encolericé con él.

Do, ĉu uzi la N-finaĵon aŭ ne? Ni vidu: oni uzas la N-finaĵon kiam temas pri ekŝanĝo de stato. Ĉe la antaŭ ekzemplo antaŭ la insultoj mi sentis nenion, tamen post aŭskulti liajn insultojn mi ekkoleris, tiu kolero naskiĝis ĝuste tiam, post aŭdi la insultojn, do, oni uzas la N-finaĵon.

Komparo:

Kontraŭ povas signifi ankaŭ “*kompare kun*”.

Kontraŭ tiuj malamikoj eĉ la superherooj estas malfortaj.

Contra esos enemigos incluso los superhéroes son débiles.

Tio estas, “*kompare kun tiuj malamikoj...*”, kompreneble el la komparo oni devas kompreni malamikan agon. Se temas pri komparo kun pozitiva sento oni uzus anstataŭ *kontraŭ*, “*kompare kun*”.

Vortfarado kun la prepozicio *kontraŭ*:

- Adjektivo KONTRAŬA: tia, ke ĝi estas kontraŭ io.
Li iris ĝuste en la kontraŭan direkton.
Mi estas kontraŭa al tiu opinio.

- Adverbo KONTRAŬE: tute alie, tute male.
Mi ne komprenas kial mi malaprobis la ekzamenon, kontraŭe, mi ĉiam pensis, ke mi aprobus.
- Verbo KONTRAŬI: havi kontraŭan volon.
La profesoro kontraŭis al la propono de la gelernantoj.
- Refleksiva Verbo KONTRAŬIĜI: ekhavi kontraŭan volon.
Ne kontraŭiĝu al la feliĉo de via filino!

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni invitas al Vi aĉeti la du lastajn verkaĵojn eldonitaj de nia asocio.



PLATERO KAJ MI

Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo da poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon.

Tradukis en esperanton: Miguel Gutiérrez Adúriz
Prezo: 8 eŭroj.



SANGA NUPTO

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituis la restarigon de la pura tragedia sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonia.

Tradukis en esperanton: Miguel Fernández
Prezo: 6 eŭroj.

Kontakt-adreso: esperanto14@ono.com

¿Quieres ayudar al movimiento esperantista andaluz?

**!!! Hazte socio de la
Asociación Andaluza de Esperanto !!!**

Para asociarte contacta con: andaluciaesperanto@gmail.com

Cuota anual: 20 €

Que puedes hacer efectivos en una de las siguientes cuentas:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Cuando ingreses el dinero de la cuota por favor envíanos los siguientes datos:

- Nombre y apellidos.
- Concepto: Cuota 2012.

Muchas gracias, necesitamos la ayuda y la colaboración de todos los hablantes de esperanto en Andalucía y también de todos aquellos que simpatizan con la lengua internacional.



Poezio

Same se ŝi de mi fuĝas,
same se ŝi kun mi restas,
ĉiam havas mi motivon
senti min sufiĉe ĝena
pri l' longeco de la nokto
kaj la ĝu' por mi aŭtenta:
povas esti long-senfina
se montriĝas ŝi mallerta,
tro mallonga se amore
ĝuas mi amoron veran !

Abu-l-Abass Ahmad ibn Sayyid *Al Liss*

Tradukis: Antonio Marco Botella



Abu-l-Abass Ahmad ibn Sayyid, pli konanta kiel *Al Liss* (la ŝtelisto), naskiĝis en Sevilo en la jaro 1108-a. Li studis en Sevilo mem kie poste li laboris kiel leksikografo kaj esploranto pri tradicioj. Admirata en lia urbo pro sia kapablo konversacii li estis tre pesimisma homo, pro tio li vivis preskaŭ ĉiam tute sola ankaŭ en Sevilo en la jaro 1182-a.

Recenzo

Portreto de poeto kun azeno

(Sur la januara numero de la revuo *Esperanto*, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, aperis recenzo verkita de Luiza Carol pri la verko “*Platero kaj Mi*”, eldonita de nia asocio. Pro la granda kvalito de tiu recenzo kaj la tutmonda dissendado de tiu revuo, ni estas tute certaj, ke la esperantlingva traduko de la ĉefa verkaĵo de Juan Ramón Jiménez estas konata de la tuta esperantistaro. Kun la afabla permeso de la redaktoro de la revuo *Esperanto* ni publikigas tiun altvaloran recenzon ankaŭ en nia revuo).

La prozopoemoj el *Platero kaj mi* prezentiĝas precipe kiel lirikismaj monologoj de poeto, kiu alparolas sian azenon Platero. Fojfoje, la poeto parolas al si mem aŭ rekte al la leganto, lasante la arĝentkoloran Platero paŝti sin aŭ dormi. Ofte aperas ankaŭ aliaj homoj kaj bestoj en la poemoj, kaj tiamaniere la tuta libro aspektas iusence kiel drameca beletraĵo, en kiun Jiménez ofte enŝovas eĉ reĝisorajn indikojn. Jen ekzemple la sceno el la poemo *La lulantino*, kie junulino endormigas sian frateton.

“La karbistino kantas dolĉe kaj tenere:

*Dormu mia bebo, dormu,
gardos vin la Dipatrino.
Paŭzo, Vento inter la arbokronoj...
Dormu ke, ĉe via dormo,
Dormu do la lulantino...*


La vento... Platero, milde pasanta inter la bruligitaj pinoj, proksimiĝas iom post iom... Poste ĝi kuŝiĝas sur la obskuran teron kaj, ĉe la longa patrina kanto, duonendormiĝas kiel infano.



Alia elemento kiu kontribuas al la drameco de la teksto estas la flueco de la parolado, kvazaŭ la teksto ne estus surpaperigita sed aŭdigata. La leganto sentas sin kvazaŭ spektanto, tre ofte ne ekster la sceno sed ene de ĝi. Tiel la duopo fariĝas fakte triopo: poeto, azeno plus nevidebla leganto. Jen bela fragmento el la poemo *La granato*, kie la poeto parolas buŝplene:

“Kiel bona ĝi estas, Platero ! Jen, manĝu ! Kiel bongusta ! Kiel plezure la dentoj penetras en ĝian gajan, abundan kaj ruĝan karnon ! Atendu... mi ne povas paroli. [...] Nu finite !”

Jiménez realigas iun apartan senton de samtempeco inter sia vivo sperto kaj ĝia poema komunikado –efeko kiun verŝajne nek kutima prozo nek tradicia (fiksaforma) poezio estus povinta krei, sed la prozopoema formo ja ŝajnas tre taŭga por ĝi. Tiu tre karakteriza samtempeco igas la leganton senti sin kvazaŭ ene de vivanta pentraĵo. Unu el la plej “pentrecaj” priskriboj en la libro troviĝas en la poemo *La infano kaj la akvo*, kie la realisma imago de infano ludanta per fluanta akvo de fonto fariĝas simbolo:



Juan Ramón Jiménez

“Kuŝe sur la tero, [la infano] tenas la manon sub la viva ŝprucaĵo, kaj la akvo formas sur lia palmo treman palacon el frisko kaj gracio, kiun liaj nigraj okuloj kontemplas en ekstazo. [...] La palaco, ĉiam sama kaj ĉiumomente renovigita, iufoje ekfalas. Kaj tiam la infano kuntiriĝas, absorbiĝas ankoraŭ pli, koncentras sin por ke eĉ tiu pulsobato kiu ŝanĝas per la movo de unu sola vivtropeco la sentivan bildon de kalejdoskopoj, ne forrabu de la akvo ĝian unuan kaptitan formon.

- Mi ne scias ĉu vi komprenos kion mi diras, Platero: sed tiu infano havas mian animon en sia mano.”

Inter la simboloj de la libro, tiu de Platero estas verŝajne la plej memorinda. La arĝentkolora azeno ŝajnas signifi purecon de animo, infanecon, bonecon, fidelemon kaj ofte la animon de la poeto mem. “Ĝi estas tiel simila al mi, tiel diferenca de la aliaj, ke mi ekkredis ke ĝi revas miajn proprajn revojn” – diras Jiménez pri sia azeno en la poemo *Amikeco*.

Malgraŭ tia ekstaza omaĝo al la pureco de infana animo, la portretoj de infanoj en la libro ne estas nepre idilie anĝeligitaj. Male, la malperfekcteco de la homa animo aperas eĉ pli klare en la kruelaj agadoj de la nezorgataj infanoj. La terura sceno kie la infanoj ŝtonmortigas maljunan blindan ĉevalinon memorigis al miu iun faman pentraĵon de Salvador Dalí, kie anĝelmiena infaneto tenas sangoplenan kadavron de rato inter siaj dentoj... Jen maltrankviliga bildo el la poemo *La blanka ĉevalino*:

“Kiam mi vidis ĝin, la ŝtonoj ankoraŭ kuŝis apud ĝia korpo, ŝtone frida. Ĝi havis larĝe malfermitan okulon, kiu blinda dumvive, nun, postmorte, ŝajnis rigardi.”

La profunda sereneco de la pejzaĝo kontrastas okulfrape kun kelkaj maltrankviligaj realismaj scenoj, priskribantaj aspektojn de socia maljusteco kaj profunda homa sufero. Tiaj scenoj senŝualigas la teruran malriĉecon de multaj vilaĝanoj, la hipokritecon de la klerikoj, la malhonestecon de la vilaĝestroj ktp. Kelkfoje, en tiaj priskriboj, Jiménez lerte humuras kaj satiras. Jen ekzemple fragmento el *La infanĝardeno*, kie la poeto alparolas sian azenon kvazaŭ li estus unu el la infanoj de la vilaĝo:

“Se vi venus en la infanĝardenon kun la ceteraj infanoj, Platero, vi lernus la abocon kaj krajonus streketojn. [...] Vi sciis pli ol la kuracisto kaj la pastro de Palos, Platero”.

Kaj jen satira portreto de andaluzia pastro en la poemo *Sinjoro Jozefo, la pastro*:

“... li iras sanktoleita kaj verŝanta mielajn vortojn. Sed, vere, tiu, kiu ĉiam anĝelas, estas lia azenino, la sinjorino.”

Unuafoje mi vojaĝis kune kun la poeto kaj lia azeno en 1966, kiam mi estis studentino. Ekde tiam, mi konservas en la koro la belegajn priskribojn de la ĉielo de Andaluzio tra ĉiuj sezonoj kaj ĉiuj horoj, kaj ankaŭ de la belaj okuloj de Platero, kies fascina personeco identiĝas kun tiu de la poeto. En 1999, mi turismumis en Andaluzio kaj renkontis la ĉielon de Jiménez en majo. Dum la unuaj tagoj de mia vojaĝo la grizaj dormemaj andaluziaj azenoj kiujn mi vidis, senluziigis min. Mi estis serĉanta la okulojn de Platero, “kiel du skaraboj el nigra kristalo” (kiel diras Jiménez en la poemo *Platero*)... Sed unu tagon, kiam mi troviĝis sur la vojo al Ĝibraltaro, mi sentis min subite rigardata de ĝuste ĝiaj okuloj kaj tiam mi rekonis “ĝin”, tian kia la poeto enigis ĝin en mian koron:



... vi, tiel intelekta, amika al maljunulo kaj al infano, al roĵo kaj al papilio, al suno kaj al hundo, al floro kaj al luno, pacienca kaj pripensema, melankolia kaj afabla. Marko Aŭreljo de la herbejoj...” (mi ĵus citis la priskribon de Platero el la poemo *Azenografio*).

Ĉi-jare mi denove renkontis la poeton kaj lian azenon, ĉifoje relegante la libron en Esperanto. La tradukinto Liven Dek estas mem konata aŭtoro de memorindaj poemecaj sciencfikciaj noveloj en Esperanto. Li verkis i.a. la plej ĉarman metaforan priskribon kiun mi iam legis pri la okuloj de ajna besto: la unu-paĝan noveleton *Ne ekzistas verdaj steloj*, (pri la okuloj de kato (en *Beletra Almanako 4*). Li verkis ankaŭ neforgeseblan kaj pensigan poemecan prozaĵon pri senĉiela urbo de grave poluita mondo,

kie maljunulo freneze sopiras pri peco da vera ĉielo: *Kien vi iras, maljunulo?* (en la antologio *Trezoro*). Mi opinias, ke malofte okazas tiom bona kongruo inter la personeco de la poeto kaj tiu de la tradukanto. La rezulto de la kunlaboro trans la tempo inter tiuj du altvaloraj verkistoj estas tiu ĉi libro, kiun mi konsidras vera juvelo de la Esperanto kulturo.

Luiza Carol



Adresoj de la Esperanto-Movado en Andaluzio

- Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
andaluciaesperanto@gmail.com
 - Malaga Esperanto-Asocio
http://www.ipernity.com/home/123729
 - Asociación Sevillana de Esperanto
info@esperantosevilla.org
 - Asociación Cordobesa de Esperanto
esperanto14@ono.com
 - Jaena Esperanto-Asocio
rindinda@gmail.com
 - Club de Esperanto de Ronda
esperantoarunda@gmail.com
 - Asociación Onubense de Esperanto
rafmagon@yahoo.com
 - Esperanto el Kadizo
esperantokadizo@gmail.com
 - Grupo de Esperantistas de Granada
http://esperantoengranadablogspot.com.es
 - Bulteno “Monate ĉe Vi”
angelarquillos@gmail.com
 - Revuo “Gazeto Andaluzia”
esperanto14@ono.com
-
- TTT-paĝo: *www.esperantoandalucia.com*
 - Blogo: *http://andaluciaesperanto.blogspot.com.es/*

Turismi en ... ECIJA (Sevilo)

La fondiĝo de Ecija okazas dum la 8-a jarcento a.K. , kiel tartesa setlejo apud la rivero Genil. Dum la romia konkero de la Ibera Duoninsulo la vilaĝo apogis Kaesaron en lia lukto kontraŭ Pompejo, tiel en la jaro 14 a.K la urbo ricevas la nomon *Colonia Augusta Firma Astigi*. La nova romia vilaĝo estis rekonstruata, la stratoj slabitaj kaj ekde tiam la romia *Astigi* fariĝis unu el la plej gravaj urboj de la romia provinco *Betica*. Ĝi produktis oliv-oleon por Romio.

Kiam la visigotoj eniris en la Iberan Duoninsulon la tiamia *Astigi* denove fariĝis grava urbo, sur ĝi sidejis eĉ kristana episkopo. Dum la islama epoko la romia *Astigi* fariĝis *Istija*. La islamo skribis pri la riĉeco de la apuda teritorio kaj eĉ ĝi ricevis la kromnomon *Madinat-al-qutn* (la urbo de la kotono)



Blazono de ECIJA

Ecija estas konata kiel la urbo de la suno. Ĝi aperas ankaŭ sur la blazono.

En la jaro 1240 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon kaj tiam stariĝis kristanaj preĝejoj kaj nobelaj palacoj por la kastiliaj konkerantoj. La plej grava epoko de la urbo estis la 18-a jarcento, temas pri la “Ecija or-jarcento”, tiam loĝis en la urbo pli ol 40 nobelaj familioj, kiuj kompreneble starigis palacojn kaj monumentajn konstruaĵojn. Krome, ankaŭ abundis la monaĥejoj kaj la preĝejoj, kun la sep turoj kiuj famigis la urbon. Do, Ecija estas unu el la plej gravaj barokaj urboj en Andaluzio.

Hodiaŭ Ecija estas unu el la plej gravaj urboj en la sevila provinco, ĝi enhavas 40.000 enloĝantojn kaj la agrikulturo estas ĝia ĉefa viv-rimedo.

Monumentoj

Palaco Benamejí

Kiel dirite, dum la 18-a jarcento nobelaj familioj starigis en Ecija imponajn palacojn. Sendube la plej bela estas la Palaco de la Markizo de *Benamejí*. Sur la faŝado troviĝas granda pordo kaj tipaj balkonoj, du turoj ornamas la konstruaĵon. Ene de ĝi troviĝas granda korto kaj ŝtuparo el kie oni povas supreniri en la du etaĝojn de la palaco. Nuntempe ĉi tiu konstruaĵo estas la urba Muzeo kaj ene de ĝi troviĝas arkeologiaj restaĵoj trovitaj en Ecija kaj ĉirkaŭaĵoj. Belega estas la “Vundita Amazono”, eble la sola en la tuta mondo kiu estas preskaŭ kompleta.



Palaco Valdehermoso



Kvankam ankaŭ temas pri baroka konstruaĵo, ĝi posedas karakterojn tipaj al la kordovaj renesancaj konstruaĵoj. Ĝi sendube stariĝas sur la plej grava loko de la urbo, ĉar el ti videblas

kelkaj el la plej belaj preĝejoj kaj turoj de Ecija.

Preĝejoj kaj Turoj

Ecija estas konata kiel la urbo de la sep turoj. Distance videblas sep turoj ornamantaj la urbon. Temas pri la turoj de aliaj sep preĝejoj kaj monaĥinejoj starigitaj en Ecija post la kastilia konkero. Oni konsideras, ke la plej antikva el tiuj religiaj konstruaĵoj estas tiu de *San Gil*. Kvankam starigita en la jaro 1479 barokaj ornamaĵoj aldoniĝis dum la 18-a jarcento. Ene de ĝi oni devas elstari la belecon de la ĉefa retablo.



Festoj

Foiro tipe andaluzia okazas dum la tria semajno de la monato septembro honore al Sankta Mateo. Dum la monato aŭgusto okazas la “Flamenka Nokto” de Ecija, unu el la plej gravaj flamenkaj festivaloj en Andaluzio kie partoprenas konataj flamenkaj kantistoj de Andaluzio. La 8-an de septembro okazas la religia festo de “Nuestra Señora del Valle”, patronino de la urbo.

Gastronomio

La gastronomio en Ecija baziĝas ĉefe sur la loka agrikulturo. La plej konata manĝaĵo estas la “sopa de gato” (kat-suppo), kompreneble la kato aperas nur sur la nomo. Temas pri varma suppo kun tomatoj,

paprikoj, ajloj, pano kaj akvo. Al la tipa *salmoreho*, oni aldonas en Ecija malvarman akvon, tiel oni povas meti sur la tablo kiel trinkaĵo kaj ne kiel manĝaĵo. Kiel deserto estas tre famaj la “*yemas*” (dolĉaĵo el sukero kaj el ovo-flavo) kaj la “*torta de manteca*”, al kiu oni povas aldoni buteron kaj marmeladon.

Venont-numere Turismi en

Álora (Malago)

aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

La 17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos en Granado

Kvankam unuamomente oni anoncis, ke la Kongreso okazus en Arundo (Malago), finfine la andaluzia esperantistaro renkontiĝos ĉi-jare en Granado.

Kiam? Nu, tiu afero ankoraŭ ne estas decidita, sed plejeble ĝi okazos dum semajnfino de la monatoj oktobro aŭ novembro de 2012. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, la asocio organizanta la kongreson, sciigos pri la definitiva dato kiel eble plej rapide, do, ni invitas Vin viziti ofte nian blogon <http://andaluciaesperanto.blogspot.com.es/>

Do, ne hezitu veni en Granadon dum sabato kaj dimanĉo por ĉeesti la Kongreson. Oni organizos ne nur kulturajn kaj distrajn programerojn, sed ankaŭ turisman viziton al la urbo.

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

*John Nisbet Wilson, instruanto de esperanto en Linares
1904*

Sur la n-ro 88-a de nia revuo ni sciigis, ke la brita JOHN NISBET WILSON instruis la internacian lingvon esperanton en Linares (Jaeno) en la jaro 1904, tamen ni bedaŭris la mankon de pliaj konitaĵoj pri tiu afero. Nu, hodiaŭ ni sukcesas aldoni pliajn detalojn pri tiu okazintaĵo, ĉefe dank'al José María de Rus kaj al Juan López Soto, esplorantoj de la historio de la Protestanta Preĝejo en Linares, kies kunlaboro kaj preteco diskonigi la enhavon de ĝiaj arĥivoj mi ege dankas.

John Nisbet Wilson naskiĝis en Skotlando en la jaro 1868. El Kilmarnok li venis en Ĝibraltaron kaj kune kun George Davis, li eniris en Algeciras, cele diskonigi la Protestantan fidon en Hispanio, afero tre malfacila, se ni scias, ke en Hispanio la rom-katolika kredo estis eĉ agnoskita oficiala fido dum multaj jaroj. John Nisbet kaj lia ĵusa edzino, li edziĝis al Agnes Young en la jaro 1892, laboris en Madrido, Vigo, Valadolido kaj Zamoro, ĉiam kiel Pastro aŭ disvastiganto de la Protestanta Eklezio.



*John Nisbet Wilson
(1868 – 1936)
kaj lia edzino Agnes*

En la jaro 1903, jam kun 3 filoj, li venis en Linares por labori en la plumbaj minejoj, regataj tiam de la brita kompanio “*Continental*

Land Company”. John Nisbet Wilson tuj kontaktis kun la Protestanta Preĝejo kaj dum kelkaj jaroj li estis la respondeculo de tiu Eklezio en Linares. Oni devas substreki la fakton, ke la protestantan fidon en Linares sekvis deko, eĉ centoj da homoj, kaj ne nur eksterlandanoj laborantaj en la minejoj. Tiel, la urbo ankoraŭ hodiaŭ posedas specifan protestantan tombejon, regata de tiu Eklezio.

Nu, en la jaro 1904 la “*Continental Land Company*” aĉetis konstruaĵon en Linares por starigi tie protestantan preĝejon, ĉe la strato *Cambroneras*. Oni devas diri, ke tiu konstruaĵo ankoraŭ hodiaŭ, tio estas pli ol cent jaroj, estas la sidejo de tiu preĝejo en Linares. Kiel dirite, John Nisbet Wilson estis la pastro de tiu protestanta komunumo dum tiu tempo, tiel okaze de la aĉeto de la domo, li petis al la kompanio la konstruon de granda salono sur la teraso de la preĝejo. La unua uzo de tiu nova salono estis organizi kurson de esperanto, ĉar John Nisbet Wilson parolis la zamenhofan lingvon kaj li estis preta disvastigi ĝin. Kompreneble la unuaj, kaj eble la solaj, lernantoj de la lingvo dum tiuj jaroj en Linares estis homoj apartenantaj al tiu preĝejo kaj kredo.

En la jaro 1912 J.N. Wilson revenis en Brition kie, sesdekokjaraĝa, mortis en la jaro 1936.

Do, utilu ĉi tiuj paĝoj kiel omaĝo al la organizanto de tiu kurso de esperanto en la jaro 1904, sendube la unua kurso okazigita en Andaluzio de nova lingvo apenaŭ dudekjaraĝa.



*La numero 100-a de nia revuo aperos dum la somero de la jaro 2013.
Ĉu Vi deziras kunlabori kun tiu numero?*

*Ni invitas al ĉiuj geesperantistoj kunlabori pere de artikolo, desegnaĵo,
rakonto aŭ kia ajn kunlaboraĵo.*

Se Vi estas preta kunlabori kun ni, bv. kontakti kun: esperanto14@ono.com

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La “cabañuelas”

La “cabañuelas” estas metodo uzata en Andaluzio de la ter-kulturistoj por prognozi la veteron sufiĉe antaŭ-tempe kaj bazita sur empiriaj aferoj. Similaj metodoj ekzistas ankaŭ norde de Hispanio kaj eĉ en Ameriko, kvankam ili ricevas aliajn nomojn (*temporas*). Laŭdire, la vorto “cabañuelas” devenas el la kabanetoj pendumitaj de la hispanaj judoj en iliaj domoj okaze de la Tendo-Festo memorantaj jarojn en la dezerto. Pro la fakto, ke dum tiu festo oni prognozis la veteron, oni prenis nomon *cabañuela* por tiu celo, tio estas: prognozi la veteron.

Vere, tiu kiu bezonis antaŭ-koni la veteron estis la ter-kulturistoj, tie oni povis fiksi la tempon ĝusta por planti, por rikolti, ktp. En Andaluzio oni priatentas la 24 unuajn tagojn de la monato Aŭgusto, tiam oni konas la veteron de la venontaj dekdu monatoj, tio estas: la unua de aŭgusto korespondas al la monato aŭgusto mem; la dua de aŭgusto al septembro, la tria al oktobro..., sed nur rilate la 15 unuajn tagojn de tiu monato. Kiam oni atingas la 13-an de aŭgusto, tiu tago korespondas al julio, sed vere al la 15 lastaj tagoj de la monato. La 14-a de aŭgusto al junio, la 15-a de aŭgusto al majo.... kaj tiel inverse. Pli malpli laŭ la jena bildo:

| <i>Cabañuelas</i> antaŭen | | <i>Cabañuelas</i> malantaŭen | |
|---------------------------|----------------------|------------------------------|----------------------|
| Tago de Aŭgusto | Korespondanta Monato | Tago de Aŭgusto | Korespondanta Monato |
| 1 | Aŭgusto (1 / 15) | 13 | Julio (16 / 31) |
| 2 | Septembro (1 / 15) | 14 | Junio (16 / 30) |
| 3 | Oktobro (1 / 15) | 15 | Majo (16 / 31) |
| 4 | Novembro (1 / 15) | 16 | Aprilo (16 / 30) |
| 5 | Decembro (1 / 15) | 17 | Marto (16 / 31) |
| 6 | Januaro (1 / 15) | 18 | Februaro (16 / 28) |
| 7 | Februaro (1 / 15) | 19 | Januaro (16 / 31) |
| 8 | Marto (1 / 15) | 20 | Decembro (16 / 31) |
| 9 | Aprilo (1 / 15) | 21 | Novembro (16 / 30) |
| 10 | Majo (1 / 15) | 22 | Oktobro (16 / 31) |
| 11 | Junio (1 / 15) | 23 | Septembro (16 / 30) |
| 12 | Julio (1 / 15) | 24 | Aŭgusto (16 / 31) |

Kompreneble, ĉi tiu prognozo ne estas tiel simpla, ĉar estas necese studi sufiĉe abunde kia estas ĉiu tago. Tio estas, se la ĉielo aperas tute klara kaj sen-nuba, la monato esence estos seka; se la ĉielo ests pala, verŝajne la plejmulto el la tagoj de tiu monato estos pluvaj. Same pri la suno, ŝe ĝi estas ruĝa dum la mateno, plejeble okazos malvarma vetero; se la ruĝa suno aperas dum la subsuniro, verŝajne ne ekzistos pluvado.


Verdire ne temas pri ekzakta scienco, ja eĉ ne pri scienco, krome la rigardado de la vetero estas tute malsimila en unu aŭ aliaj zonoj. Tamen, oni devas kompreni la deĉiama bezono de la ter-kulturistoj antaŭ-koni la veteron, kaj la veter-prognozo ĉe la amas-medioj ekzistas nur de antaŭ malmultaj jardekoj.

Persone, mi devas diri, ke mia avo, ter-kulturisto dum sia tuta vivo, neniam fidis pri la veter-prognozo kiujn li aŭdis pere de radio aŭ televido. Kontraŭe, li ĉiam fidis pri la “*cabañuelas*”, malgraŭ la fakto, ke li aŭskultis la radiajn informojn pri vetero.

J.M.R.H.



Krucvortenigmo .-



Horizontale:

A. (plurale) Poemo destinita esti kantata honore al Lando, Dio, idealo, ktp.
 B. Moviĝi de unu loko al alia. ■ Konjunkcio uzata post supereca aŭ malsupereca komparativo. C. Adverbo esprimanta, ke oni malakceptas. ■ Finaĵo de la adverboj. ■ Konsonanto. Ĉ. (inverse kaj sen la lasta vokalo) Diferenco inter debeto kaj kredito. ■ Finaĵo de la infinitivoj. D. Nedifina pronomo, montranta iun objekton. ■ (Sen la lasta vokalo) Maldika kaj malpeza travidebla teksaĵo. E. Ĉiu kombinaĵo de oksigeno kaj alia elemento.

Vertikale:

1. Azia ŝtato. 2. (inverse) Senti fortan agitiĝon de la animo, kaŭzata de ofendo aŭ nekontenteco. 3. Persona pronomo. ■ Finaĵo de la adjektivoj. ■ Konsonanto. 4. Finaĵo de la akuzativa formo. ■ Verbo esprimanta la ekziston. 5. Konjunkcio uzata post supereca aŭ malsupereca komparativo. ■ (inverse) Numeralo. 6. (inverse kaj plurale) Manĝebla frukto de arbo tre ofta en Andaluzio.

Solvo al la enigmoj de la numero 93-a

Ĉu Vi praktikas sporton?

- | | | |
|--------------|---------------|----------------|
| 1. Volejbalo | 2. Arkopafo | 3. Halterlevo. |
| 4. Kanuado | 5. Trampolino | |

Interlingvistika Logiko

1879 → Volapük

1887 → Esperanto

1907 → Ido

1928 → Novial

1951 → Interlingua

HUMURO



Sur la radiografiaĵo aperis rompita ripo,
sed ni solvis la problemon pere de *Photoshop*.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto de Sevilo: José Roldán León
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



La interacción lingüística

ESQUEMA